# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 7-a de Marto 2022

**Ĉeestantoj**: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Ŝaj Mor (parte), Amri Wandel (fizike); Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Juval-Vodevoz, Gabi Zeevi (zome). **Gastoj** (parte): Jinon Meiri, François Lo Jacomo, Enrique (Kalifornio).

***Protokolo** de la pasinta (februara) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigita.*

## 1. Raportoj

a) **Jehoŝua**: la sendataj malnetoj de la protokoloj aspektas fuŝe printitaj – sekve ni uzu kongruajn formojn de la teksto-prilaborilo; jam sendis la etiked-listojn al Mikaelo. Mikaelo sendos al Amri la pretajn kovertojn (kun la adresoj).
b) **Amri**: en la ĵusa kunveno partoprenis pli ol 30 homoj, ĉ. 20 el eksterlando. Mikaelo gvidis emocian prezentadon de Ukrainio kaj diskuton pri la milito.

## 2. La 22-a Israela Kongreso (Jehoŝua, Amri)

a) Dum la konfirmo al la hotelo **Jehoŝua** certiĝis per "dorsosaka" demando pri la prezo, kaj tiel evidentiĝis, ke la prezo estus 450 NIS por unu nokto por unu persono, do, 1,800 NIS por paro por du noktoj. **Amri** minacis turni al la Asocio de Hoteloj pro la nebula formulado de la kontrakto. Estis atingita kompromisa solvo: ni rezignos pri la vespermanĝoj, kaj la fina prezo estos **1,200 NIS por paro por du noktoj**, do la israelanoj pagos iom pli (600 NIS anstataŭ 450 po persono en dulita ĉambro). Por la eksterlandanoj: la diferenco estas sorbebla de ELI, ĉar la prezo antaŭvidis marĝenon por kurzoŝanĝoj kaj programkosto.
b) **Amri**: Ĝis nun 8 homoj mendis la 5-tagan postkongresan ekskurson, kaj ankaŭ la gastejoj (Jerusalemo, Ein Gedi, Eilat, Jordanio) estas menditaj.

## 3. Deklaracio pri la ukraina-rusia milito (Ŝaj, Amri)

**Amri**: la teksto estas sufiĉe milda, esence kontraŭmilita, sen apogo de unu el la flankoj, kvankam enestas pluraj eraroj – tajpaj kaj gramatikaj. **Decido**: (unuanime) Amri kaj Jehoŝua telefone poluros, poste Amri afiŝos ĝin en ELI-listo kaj UEA-medioj nome de ELI.

## 4. Magazeno

**Jehoŝua**: la helpisto de Jinon taksas la kvanton je ĉ. 5,000 libroj.

## 5. Asekuro de la Dratwerejo (Ŝlomo)

**Ŝlomo** daŭrigis la traktadon, ĉar la asekuro finiĝis la 28-an de Februaro (kvankam ne menciis ĉi tion el sia antaŭa retletero al la estraranoj). **Eran**: ankoraŭ eblas trarigardi la detalojn, modifi, kaj fari eble malpli kostan kontrakton. **Aliaj**: la eventuala diferenco ne pravigas re-traktadon. **Decido**: venontfoje Ŝlomo anticipe atentigu la Estraron pri la finiĝo de la asekuro.

**2/...**

**6. <u>Oficejo</u>** (Amri)

a) Ĝis nun nenio nova de Bar Vardi, la luigo-administranto de nia etaĝo. Amri parolis kun la peranto de la Dratverejo pri luigo de nia oficejo, kaj tiu promesis sendi prez-oferton (ankoraŭ ne faris).

**La venonta kunsido**: lunde, la 4-an de Aprilo 2022, je la 20h00 (Alon-turo, hibride)
*Protokolis: Gabi Zeevi*